



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/k33.html>

Fondaĵo Murcia en Togolando!

La mallongigo de la deĵordaŭro: ĉu efika rrimedo kontraŭ la sendungeco? (paĝo 11)

Ĉu esperantista aŭ esperantano? (p. 19)



La 250^a datreveno de Goya (p. 5)

Nº 33

Januaro/Marto 1997

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martín Bustín Benito.**
Apartado de Correos 4143
E03080 ALICANTE
(Hispanio)

Faras la Kajeron:
Provkorektanto: **José Pina Tuells,**
Administra laboro: **Juan Antonio Cabezas**
Martínez,
Redaktoro: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Secretario: **Jesuo de las Heras Jiménez,**
Apartado de Correos 4461
E30080 MURCIA (Hispanio)

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03369 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
nova konto n° 1302 0412 86
0022655110 en libreta de Caja Postal.
Sen aldona kosto. La paginto bonvolu
sendu fotokopion de la pagilo al
la Kasisto, S° Bernabéu.

Kovrilo: Monumento al Sendependeco ĉe Lomé, Togo, kie la Tago de Zamenhof estis tiel aparta, kiel ni rakontas en paĝo 16.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecu la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

| | |
|---------------------------------------|----|
| Redaktore | 3 |
| Ĝenerala Kunsido de HALE! | 3 |
| Informoj de la Prezidanto | 4 |
| Omaĝo al Goya | 5 |
| Luksaj plumoj | 7 |
| Omaĝo al kdo Roland LEVREAUD .. | 9 |
| Anoncoj | 9 |
| Gastiganta grupo en Bulgario. | 9 |
| Deziras korespondi | 9 |
| Deklaracio | 10 |
| Eseo monatotria | 11 |
| Zamenhof-Festo en Togolando | 16 |
| K.F.D: 7 al 12. | 17 |
| Ĉu esperantisto aŭ esperantano? | 19 |
| Gvidrezolucio | 22 |
| La statutoj de HALE | 23 |
| La tajforegno de Murcia | 27 |

Enhavo

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne fitraktas iun ajn personon.

Redaktore: *Seriozeco, dececo ne signifas diktatoreco.*

Kelkaj samideanoj sciigis min pri *diktatora* interpreto de mia lasta editorialo fare de ili. Mi ne volis diri tiam, ke oni parolos en tiu ĉi magazino nur pri tio, kion la redaktoro volos, sed ke la lingva respondeco de la revuo kuŝas nenie ol ĉe la redaktoro mem, kaj ne ĉe eventualaj aŭ kutimaj provkorektantoj. Sed mi ankaŭ proklamis tiam, ke koncernas sole la redaktoron la difino de la politiko de la magazino, kaj tiusence *Kajeroj el la Sudo* estas mia magazino kvankam ĝi samtempe servas HALEn kiel organon kaj ligilon. Tamen, la magazina politiko estas klare difinita ĉe la paĝo 2, apud la *enhavo*. La paĝoj de la magazino estas malfermitaj al tiuj,

kiuj havas ion por diri, kiel vi vidos en la sekvantaj paĝoj. *Kajeroj el la Sudo* portos vian voĉon tra la tuta mondo pere de Internet, kaj pro tio viaj artikoloj devas esti respondecaj kaj respekti veron. Tio donas gravecon, sed ankaŭ mirindecon, al tio, kion vi povas kaj volas diri.

Pro tio mi nur diros nun, ke kvankam oni menciis la redaktorojn de *El Correo del Esperanto* kaj *Kajeroj el la Sudo* en la lasta numero de *Boletín*, oni ne diris tie la veran mesaĝon, ĉar *la sanktan nomon de HEF* estos uzita inter ni ĉiu foje kiam ni trovos interesa por niaj legantoj, ĉu favore, ĉu malfavore nur dependante el tio, kion la respondeculoj de HEF faras kun ĝi. Ni neniam parolis nek parolos *nome de HEF*, sed ni daŭrigos parolante pri ĝi senrigardante la cenzuron. Se necese, ni plie klarigos niajn enigmajn vortojn nunajn, sed ni preferus fari tion en la paĝoj neinternetaj de *Boletín*...

Tiu ĉi foje ni turnis al laboristaj temoj pere de longa eseo verkita de laboristoj italaj virinaj Ritanna Armeni kaj Rina Gagliardi kaj tradukita de José Pina. Eble estos reagoj pri ilia temo.

Grava novaĵo estas, ke ni kunvenos je la 7-a de februaro en Murcia por historia decido. Ni opiniis, ke ĉiu ano de HALE devus havi kopion de nia statuto, kaj sekve vi trovos ĝin en paĝo 23. Se vi ŝatus ŝanĝi ion, vi havos la ŝancon la venontan monaton!

Ĝis la (ĉi foja?) revido!

Laŭ direkto de la Prezidanto, ĉi tio kunvokas la tutan anaron de HALE al

Ĝenerala Kunsido

kiu okazos je la venonta **7-a de februaro de 1997, vendredon**, posttagmeze la 5-an horon kiel **unua kunvoko**, la 5'30an kiel **dua**, kaj la 6-an kiel **tria kunvoko**, en la Kafejo **El Candela**, Av^a Juan Carlos I, 24, 30008 MURCIA, sekvante tiun ĉi

TAGORDON:

- 1 Reformoj de Statutoj (kfr. pĝ. 23).
- 2 Elekto de nova Estraro.
- 3 Budĝeta raporto, de la kasisto.
- 4 Demandoj kaj proponoj.

Murcia, je la 10-a de januaro de 1997

La sekretario,

Jesuo de las Heras Jiménez

Informoj de la Prezidanto

La 69^a kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), en kiu mi patroprenis, okazis en la urbo Sankta Petersburgo de la 13^a ĝis la 20^a de Julio de 1996, en kiu partoprenis 240 reprezentantoj el 21 landoj.

Mi nek informos pri la aferoj diskutitaj en la asembleoj, nek pri la kongresa temo, *La mondo sen bariloj de la naciaj antaŭjuĝoj*, ĉar ĉiuj SAT membroj estas informitaj per bulteno **Sennaciulo**. Gravaj gvidrezolucio kaj deklaracio estis deciditaj. Mi ilin sendis al la redaktoro de *Kajeroj el la Sudo* por ilia publikigo en nia bulteno.

S. Petersburgo estas belega urbo. Laŭ informoj kiun mi povis havi ĝi estis fondita en la jaro 1703 laŭ ordono de Petro la Unua. La urbo troviĝas ĉe la bordoj de la rivero Neva kiu elfluas el Ladoga lago kaj enfluas la finnan golfon. La urbo lokiĝas sur 42 insuloj, kaj ĝi situas ses gradojn pli sude ol la Arkta Cirklo. Ĝi estas loĝata de kvin milionoj da homoj, kaj kelkfoje ŝanĝis la nomon: 1703 S. Petersburgo, 1914 Petrogrado, 1924 Leningrado, kaj 1991 denove S. Petersburgo. Oftas pluvoj kaj ventoj. La klimato estas kruda vintre. Okazas inundoj pro natura fenomeno *longa ondo*.

Mi spertis dum mia restado malbonan veteron ĉar ĉiutage pluvis aŭ blovis malvarma vento. Malgraŭ tio eblis viziti kelkajn el la multaj vidindaĵoj. La tuta urbo estas grandega muzeo sub la ĉielo: Multaj kajoj, kanaloj, fontoj kaj avenuoj inter kiuj la avenuo Nevskij estas la plej fama. Dum ŝipveturado tra ĝiaj nombraj kanaloj ni povis admiri la belecon kaj majestecon de

konstruaĵoj inter kiuj troviĝis palacoj, muzeoj, parkoj, statuoj, pontoj, k.a.

Malgraŭ la informoj pri kreskado de krimoj, ŝteloj kaj aliaj malbonaĵoj en Sankta Petersburgo, mi nek suferis ian ajn atencon al mia persono nek al niaj posedaĵoj.

Certe la politika kaj socia situacioj estas tre malstabilaj, kaj streĉaj. La homoj havas malfacilaĵojn por normale vivi ĉar inflacio rapide progresas multe pli rapide ol salajroj, kaj pensioj kio mizerigas la popolon. Plie la antaŭa komunisma reĝimo kaŝe revenas ĉar en liberaj balotoj multaj komunistaj reprezentantoj estas elektitaj sub demokrata aŭ liberala etikedo kiujn ili nun adoptas, kaj granda parto el loĝantoj postsopiras la pasintan tempon kompare al la nuna ĥaoso. Restas multo por fari antaŭ ol en tiu granda lando regu vera demokratio.

Nia asocio HALE stagnas kaj ĝia komitato daŭre lamas. Iom ĝi pliboniĝis ĉar ni povis starigi libroservon dank' al sindonemo de nia kamarado Nikolas' Ĥil Karballo de León, kiu akceptis respondeci pri ĝi. Malgraŭ miaj konstantaj alvokoj al ĉiuj SAT aŭ HALE membroj, neniu sin proponis kiel vicprezidanton aŭ sekretarion de HALE. Ĉu vere neniu deziras helpi nian Asocion? Oni ne povas kredi ke koheraj membroj lasu pere ian HALEn... Denove mi petas vin akcepti postenojn kiuj estas nek komplikaj nek tro temporabaj. Kiel ĉiuj scias, mi estas peranto de SAT por nia lando, prezidanto de HALE, kaj ankaŭ peranto de gazeto *Laŭte*. Ankoraŭ foje ĉi jare mi komencis helpi lerni Esperanton al junuloj en sindikatejo. Mi ne petas, ke ĉiuj faru kiel mi ĉar ĝi estas mia persona elekto, sed almenaŭ tiu kiu povas, bonvolu kunlabori por ke ni estu asocio kiu meritas tiun nomon!

Kamaradece al vi,

Marteno

Omaĝe...

Datreveno de Francisco de Goya y Lucientes

de Antonio Marco Botella

Ducent kvindek jaroj post la naskiĝo de la granda pentristo Francisco de Goya, ŝajnas kvazaŭ kultura devo elvoki la figuron de unu el la plej elstaraj universalaj geniuloj de l' pentroarto. Kelkaj ŝatas substreki la majstrecon de

liaj pentraĵoj en *Las Majas* (la belulinoj), aliaj la magion de liaj klaroskuroj kaj vermilionoj, ne malmultaj sin sentas kaptitaj de la mistero kaj sorĉo de *la kapricoj*, kolekto de *stravagancaj* desegnoj, sen atento al iuj ajn artaj reguloj aŭ logiko, pro kies pentraĵoj Goya estis denunciata antaŭ la Inkvizicia Tribunalo, same kiel jam antaŭe okazis kiam li pentris las *majas*. Sed ni delasu la temon pri la arto de Goya kaj prefere atentu aspektojn pri la homaj viveroj de la granda artisto:

Francisco de Goya y Lucientes naskiĝis en Fuendetodos, vilaĝo tre proksima al Zaragozo, kie loĝis la geedzoj Goya kiam naskiĝis Francisco. Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis la domon kie naskiĝis kaj loĝis siajn unuajn jarojn la infano Francisco. Ĝi estis la domo de malriĉa

kampanaro, simile al la ceteraj de la kamparaj loĝantoj. La domomuroj estas ŝtonaj, kun malgrandaj fenestroj, same kiel tiuj kiujn oni konstruis en tiu epoko en loko kie la klimato estas tre ĝena. La mebloj kaj iloj ene de la domo estas iom

pli ol modes-taj, nun oni dirus mizerajn. Post tiuj unuaj jaroj la knabo Goya translokiĝos al Zaragozo, kie li, kiel ido de malriĉa familio, devis lerni profesion, li do eniris en la pentrolaborejon de José Luzán (1710-1785), grava



zaragoza pentristo, kiu, laŭ deklaro de la propra Goya: *oni lernigis al mi la pentroteknikon, devigante min kopii dum kvar jaroj multnombrajn gravuraĵojn ekzistantajn en la laborejo de Luzán*. Tiu trejnado multe influis en lia formiĝo kiel artisto. En tiu laborejo li komencis desegni siajn unuajn proprajn pentraĵojn.

La junulo Francisco estis petolema ulo, tre inklina al ŝercado inter siaj amikoj kaj speciale amindumema al fraŭlinoj... Profesie li pentris en aragonaj preĝejoj

(Muel, Remolinos, k.a.) surmurajn pentraĵojn, kiuj montras la sperton de la artisto, sed kun detaloj promesplenaj.

Kiam li estis 25-jara, Goya forveturas al Italio, kie li studadis la barokan romanan stilon kaj la freskoartan teknikon, kiel scio donis al li la sufiĉan kuraĝon por partopreni en plej prestiĝaj artaj konkursoj, inter aliaj li konkursis en tiu organizita de la Akademio de Parma por la pentraĵo *Anibal sur Alpoj* (malaperinta) ricevinta honoran mencion.

Post lia reveno de Italio li pentras gravajn surmurajn pentraĵojn en plej gravaj zaragozaj preĝejoj, sed li volas superi sin en la propra arto kaj serĉas laborejon en Madrido. Fine, li sukcesis daŭre loĝi en la ĉefurbo kaj en 1773 Goya edziĝis kun Josefa Bayeu, fratino de la famaj aragonaj pentristoj Francisco, Ramón kaj Manuel Bayeu, kaj per influo de siaj bofratoj li eniris labori en la Reĝa Fabriko de Tapiŝoj, kie li malvolvis gravan aktivadon: de 1775 al 1792 li pentris en tiu fabriko multajn modelojn sur dika papero, kartono aŭ tolo por tapiŝoj aŭ freskoj.

En 1780 oni elektis lin membron de la Akademio San Fernando: la arto de Goya evoluis al plej perfekta esprimoriĉo. En 1792/93 Goya grave malsanis kaj kiel rezulto de tiu malsano li restis tute surda. Tiu fizika difekto acidigis lian temperamenton, sed samtempe riĉigis la internan vivon de la la artisto impulsante lian imagecon al fantazia mondo, kio obligis lian kreadon de *la kapricoj*...

En 1823 finiĝis en Hispanio la periodo politike nomata *konstitucia* kaj la reĝo

Fernando la VII^a okupis la tronon kun karaktero absoluteca, tio estis interpretita de militistoj kaj reakciuloj kiel oportuna momento por komenciĝo de mortpersekuto kontraŭ liberaluloj. Goya sin sentis persekutata, unue serĉis rifuĝon ĉe liberala pastro, kaj tuj post agreso-periodo li petis permeson al la reĝo viziti la francan banejon *Plombières*, kaj de tiu momento li loĝis en Bordoza, memvole ekziliginte, kie li plu pentradis ĝis sia forpaso en 1828, jam 82-jara.

Rubén Darío, kiu tiom admiris la aragonan artiston, dediĉis al li jenan poemon:

*Por vi, genia homo kara
mi uzas belajn vortojn laŭdajn!
Por vi, vizia ul' plej fama!
Por vi, kun artpaletro maga,
kaprice rava kaj impeta
de ĉiu gepoet' amata:*

*pro viaj nigroskizoj svagaj,
la vermiljonoj kaj tenebroj,
kaj la radioj lume blankaj!*

*Pro viaj freskoj admirataj,
fanfaronuloj pitoreskaj,
dantesk-koloroj riĉohavaj!*

*...Ĉar vi prezentas sorĉon artan:
jen blondan bebon orobuklan
aŭ taŭron lerte artludata!*

*Kaj kun toreadoro brava,
infanton, kavaliron, damon,
mantilojn kun floraro ĉarma.*

*Per man' inspirfreneza arta
vi pentras sorĉajn siluetojn
en grizaj ombroj okulfrapaj.*

Vi kaptis la abrakadabra-n!

Luksaj plumoj

Ĉi tie skribas samideanoj kiuj kutime ne faras tion, sed nepre havas multe por diri. Tial iliaj plumoj estas vere *luksaj*.

Malaperinta laborista familio en Callosa del Segura

de José María Bernabéu

Ŝia edzo, Manuel Zaragoza, ankoraŭ tre juna forpasis pro knaba malsano, lia malsana metio atakis lian bruston infektante bronkojn kaj pulmojn. Aktivisto en la UGT (Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj), li postlasis tri gefilojn ankoraŭ en la infana aĝo.

Patrino kaj gefiloj loĝis ĉe la Popoldomo en laboro helpante per sia laboro la mastrumadon kaj ordigadon de la laborista sidejo kie la gefiloj plu aĝis en etoso de konstantaj konfliktoj inter laboristoj kaj labordonistoj heredante de sia patro la spiriton de respondeco en la plenumado de siaj komisioj.

Estis tempo de forpaso de la Diktaturo de Generalo Primo de Rivera kiam la laboristaro plene interrilitis por atingi pli decajn laborkondiĉojn, komencis planado de laboristaj postuloj kelkfoje kun strikoj ne ĉiam sukcesintaj. En tiu landa situacio eksplodis granda laborista ribelo en interkonsento kun parto de la militistaro kies celo estis la alvenigo de la Respubliko en Hispanion, sed la fiasko de tiu konflikto kondukis en Jaca (Huesca) al mortpuno de kapitanoj

Fermín Galán kaj García Hernández; ankaŭ en Callosa de Segura reliefigis tiu ribelo, dum la mateno de la 15^a de Decembro de 1930 estis mortpafata Manolín Zaragoza Pareja, 16-jaraĝa, filo de la forpasinto Manuel Zaragoza, kiu



Jen la *Popoldomo* de Callosa de Segura: ĉi tie *Onklino Dolorikas* vivis kaj laboris kiel servistino.

inter la avangardo de la strikantoj intencis ĵeti ŝtonon kontraŭ la Civila Gvardio. En tiu sama tago posttagmeze oni enterigis tiun junulon en Cox, proksima vilaĝo. Neniam mi povos forgesi la ĉagrenon kiu svarmis ĉe la kunvenantoj dum la enterigo, estis scenoj por ĉiam gravuritaj en la menso de mia 9-jaraĝa vivo...

Kun tre amara sento restis la patrino, karese nomita *Onklino Dolorikas*, post la perdo de sia plej aĝa filo kaj kvankam la forpaso de la tempo iom mildigis la

tragedion: la kreskado de la du gefiloj alvenigis pli da harmonio en la familion, ja Mari Cruz kaj Trino, mia kara amiko, vigliĝis inter la junularo.

La 14^{an} de aprilo 1931 heligis Hispanion la alveno de la Respubliko, ĉie flirtadis la tri kolora standardo. Post kelkaj jaroj la politika situacio krispigis tiel akre la kunvivadon en la lando, ke la morto, ne oficiale klarigita, de José Calvo Sotelo aperis kiel sojlo ĉe la horizonto de grava konflagracio. La ribelo de la militistoj kontraŭ la ĵus proklamita registaro, kiu per landa demokrata voĉdonado estis elektita nur antaŭ kvin monatoj decidigis la intercivitanan militon.

Refoje la fatala Parco masakris la vidvinon, Onklinon Dolorikas, ŝia filo Trino 18-jaraĝa pereis kiel batalanto ĉe la fronto de Teruel kiel, laŭ kunbatalantoj, malamika kuglego falis internen de la tranĉeo kiam li deĵoris en streĉita korpstato. Dume la filino Mari Cruz, tiam 20-jaraĝa kaj kiu militservis kiel helpantino en la flegistina servo ne tuj sciis pri la morto de sia frato Trino, kvankam ne plu daŭre ŝi povis kaŝi tiun fatalan informon.

Finfine ĉesis la milito kaj Mari Cruz revenis hejmen sed kun tuberkuloza malsano kiu akompanis ŝin ĝis sia morto en la tuberkuloza malsanulejo Sankta Magdalena de Castellón, kie mi vizitis ŝin dum la somero de 1966, unu jaro antaŭ ŝia forpaso.

Ankoraŭ vivis la onklino Dolorikas dum tri postaj jaroj en plena izoliteco... *Feliĉe* en la lasta jaro ŝi ne plu konseiiĝis pri iu ajn ĉirkaŭanta afero. La urba hospitalo, flegata de karmelaj monaĥinoj, estis la lasta hejmo de la malfeliĉa vidvino.

Jen malaperinta familio kiu fordonis siajn membrojn en batalo por plibonigo de la socio. Restis neniun membro kiu povos porti la torĉon de la familio por pliaj generacioj.

Callosa de Segura, la 10^{an} de Oktobro

*de korna kaprokrurdiablo,
kiam makabre ĝi grimacas.*

*Fantom', meduz', anĝelo blanka,
konfuza lum' inspir-fiera,
aperas via Muzo rava.*

*Via peniko miras gapa,
per klaroj, kiuj ja delectas,
per ombroj ŝajne sonvibrantaj:*

*per belaj damoj tipvestitaj,
kaj brilaj reĝoj, uloj povraj
kaj kristmienoj suferantaj...*

*En via klaroskur' kabala,
hororon vibras el pezsong'o
kaj mortiĝantaj lumoj flavaj,*

*vi montras kun anĝeloj blankaj
terurajn fimurdist-okulojn
en belvizaĝoj in-infanaj.*

*Viaj kapric-esprimoj gajaj miksas
la nigron el fridnokto
kun la tagiĝa lum' neĝblanka.*

*Tiel mirinde disproklamas:
San Antonio² per la freskoj,
kaj la demonojn malhumanajn!*

La arto de la genia artisto de Fuendetodos ne kadukas kun la forpaso de la tempo!

Antonio Marco Botella.

NOTOJ.- ¹abrakadabra: kabala vorto greka, al kiu oni atribuis en la antikveco magiajn virtojn. Oni devis skribi la literojn de abrakadabra triangulforme, tiamaniere ke ĝi estu legebla laŭ pluraj direktoj. Nun oni ĝin uzas por esprimi ion konfuzan, surprizan aŭ ĝojigan.

²La poeto aludas la freskojn de preĝejo de Madrido nomata **San Antonio**, pentritajn de Goya.

Komuniko de SAT-Broŝurservo:

Omaĝo al k^{do} Roland LEVREAUD

Por plu omaĝi al nia karmemora k^{do} ROL (lia bela traduko de *Memvola servuto* de la Boétie estas havebla kontraŭ 100 francaj frankoj ĉe k^{do} B. Schneider) SAT-Broŝurservo preparas eldonon de liaj artikoloj kaj prelegoj de 1950 ĝis 1989.

Sub la titolo *Ne nur vortoj, sed agoj* baldaŭ aperos la unua, 112-paĝa, kolekto de artikoloj.

Sekvos alia broŝuro: *Prelegoj kaj aliaj artikoloj* arigonte la tekstojn aperintajn en *Sennacieca Revuo* (80 paĝoj en formato A4).

Ambaŭ estos disponeblaj kaj liverotaj en la unuaj monatoj de 1997. En *Laŭte* de novembro-decembro de 1996 aperas la detala enhavo de ambaŭ broŝuroj.

Kiel akiri ilin?

*Se vi jam estas abonanto de la broŝura serio kaj disponas pri sufiĉa kredito, vi ricevos ilin aŭtomate.

*Se vi estas abonanto de *Laŭte!*: aldonu 70 FRF (aŭ egalvaloron), kiam vi reabonos al la gazeto. Tiel, kontraŭ 150 FRF vi ricevos la jaran gazetkolekton (6 numerojn + adresaron) kaj la du broŝurojn de kamarado ROL.

*Se vi ne estas abonanto de *Laŭte!*: jen vi ĵus legis kiel profiti bonan okazon por konatiĝi kun ĝi!

*Se vi deziras ricevi nur ambaŭ broŝurojn de k^{do}. ROL: tio kostos al vi 90 FRF (inkluzive de la afranko).

Ĝiri al jena poŝtkonto:

Cercle amical espérantiste, 33 71 74
Bordeaux.

Anoncoj:

Gastiganta grupo en Bulgario.

Kvinmembra gastiganta grupo estis organizita en Bulgario por akcepti esperantistojn kiuj deziras viziti la landon. Kontraŭ malgranda pago la gastoj povos loĝi kaj manĝi ĉe la gastiganto aŭ, laŭ sia deziro, loĝi kaj manĝi ĉe hotelo. La gastigantoj estos je dispono de la gastoj por ĉiĉeroni kaj ekskursgvidi ilin, kiuj vidos belegan Bulgariion kaj vivos agrable en esperantista etoso.

Respondecaj pri la grupo: Tonĉo Vălev.
bul. Metodi Kusev 1A, ap 12, BG-6000
STARA-ZAGORA (Bulgario).

Deziras korespondi:

Miroslava Kieva Ivanova

bl. 302 vh "V" apt. 23
BG-5500 LOVEĈ (BULGARIO)
Knabino 16-jaraĝa deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

Petrana Ikonomova

Kinden n° 37,
BG-4230 ASENOVGRAD (BULGARIO):
Fraŭlino 26 jaraĝa deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

Stelka Petrova,

KV "Zapad" bl 3/8, vh B, apt 27
BG-4232 SENOVGRAD (BULGARIO):
Profesorino pri geografio 26-jaraĝa deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

Aleksina Tiŝeva

KW "3 ĉučura" bl 22-1^a apt. 118
BG-6010 STARA-ZAGORA
(BULGARIO): Patrino kaj juna filo
deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

Deklaracio

La 69-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta de la 13-a ĝis la 20-a de Julio 1996 en Sankta Petersburgo, en kiu partoprenis 240 reprezentantoj el 21 landoj surbaze de statuto kaj sub la devizo *La mondo sen bariloj de la naciaj antaŭjuĝoj*:

1 **Konstatas**: ke ĉie en la mondo okazas atakoj kontraŭ la vivo kaj la vivkondiĉoj de la laboristaro. Kreskas malegaleco inter la diversaj sociaj tavoloj. Pligrandiĝas senlaboro, ekskludado kaj mizero en preskaŭ ĉiuj landoj. Plue daŭras detruado de ĉirkaŭaj riĉaĵoj.

· Internaciaj instancoj, kiel IMF kaj transnaciaj firmaoj draste trudas al popoloj troliberalan kapitalismon, dum la amaskomunikiloj disvastigas individuismojn kaj malsolidarecon.

· La ekonomiaj politikoj aplikataj kondukas al sistema malmuntiĝo de la sociaj rajtoj kaj de la publikaj servoj.

2 Ĝi **atentigas**, ke la koncepto pri etna purigado estas instigo al krimo kaj per si mem atenco kontraŭ la homaro.

· Ĝi aparte komdamnas tiujn, kiuj deziras uzi perforton kontraŭ homoj kaj militoj kontraŭ popoloj aŭ etnoj.

· Ĝi alvokas al justa paco en Palestino, Ĉeĉenio (Iĉerio), Norda Irlando, ktp.

· Ĝi komdamnas ekonomiajn embargojn kontraŭ Kubo, Irako kaj aliaj landoj.

· Ĝi firme apogas la kampanjon de *Amnestio Internacia* kontraŭ turmento kaj mortpuno.

· Ĝi opinias, ke militkrimuloj el Eks-Jugoslavio, Ruando kaj Ĉeĉenio devas esti juĝataj, en kiu ajn tendaro ili estis.

· Ĝi esprimiĝas kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj fanatikismoj filozofiaj, politikaj aŭ religiaj kaj emfazas la rolojn de racio, toleremo kaj interdiskuto.

3 Ĝi **invitas** ĉiujn laboristojn, verajn demokratojn, maldekstrulojn tra la mondo:

· Konsciigi, ke plue daŭras ekspluatado kaj pripensi la novajn formojn de sociaj bataloj.

· Kontraŭstari ĉiujn naciismajn, rasismajn kaj ŝovinismajn fortojn.

· Atentigi pri la rolo, kiun Esperanto ludas, ne nur por faciligi la internaciajn kontaktojn en la batalo por pli justa sociordo, sed ankaŭ por superi la barilojn de naciaj antaŭjuĝoj inter diversnaciaj homoj.

· Alvoki al kunlaboro kun laboristaj Esperanto-grupoj kaj organizoj por tiuj celoj kaj petas specialan subtenon por la taskoj de Sennacieca Asocio Tutmonda.



Eseo monatotria:

La mallongigo de la dejordaŭro. Ĉu efika rimedo kontraŭ la sendungeco?

Ritanna Armeni kaj Rina Gagliardi

*La neceso kontraŭbatali la amasan sendungecon vaste ekzistanta en la plejmulto el la kapitalismaj landoj evoluintaj, ekde meze de la sepdekaj jaroj, estas revigliginta la proponon mallongigi la dejordaŭron kiel unu el la prioritataj vojoj por alfronti tian problemon. Kun tiu ĉi aranĝo akordas la plejmulto el la maldekstrulaj tradiciaj tendencoj same kiel tiuj novaj ekologiismaj fluoj. Sekve mi montros al vi tradukon en Esperanton pri la menciita temo originale verkita de Ritanna Armeni kaj Rina Gagliardi (italaj ekonomiistinoj). Mia celo estas komenci debaton en **Kajeroj el la Sudo** pri la supre menciita problemo. Jen la tradukita eseo:*

La vojoj al la laboro

—*La laboro estas la cirkonstanco mem de la homo kvazaŭ maŝine prikonsiderita, tiu estas, la ago per kiu la homo produktiĝas aŭ objektiĝas. Jen kion verkis la junulo Marx (**Manuskriptoj: ekonomio kaj filozofio**). La laboro, do, estas kiel formulo de uzvaloroj, kiel efikilo, kondiĉo de la ekzisto de la homo, sendepede de ĉiuj aliaj formoj de la socio; ĝi estas eterna neceso de la naturo, kiu utilas por peri pri la organa interŝanĝo de la homo al la naturo, tio estas, pri la vivo homa. Tiel verkis la maljuna Marx (**La Kapitalo**, libro I). Certe ne estas pro doktrinema gusto ke konvenas ree pripensi la aferon laboran ekde la klasikuloj, ankaŭ ne povas nature la klasikuloj anstataŭi la necesan analizon kiu nuntempe; en la tumultoza mondo*

sursojle al la jaro 2000, kiu staras antaŭ ni; nepras realigi; ankaŭ ne plu eblas al la maldekstrularo foreviti fazon de proponado de teorioj kaj politikoj, krom de reelpensado kaj rekonstruado. Evidentiĝas ke nuntempe la problemoj ŝajnas preskaŭ nesupereblaj; eĉ per sia difino mem. La maldekstrularo, la sindikatoj kaj la labormovado montriĝas senarmitaj, nehavantaj la adekvatajn ilojn por almenaŭ ataki la problemon kaj eksponi ĝin plenkompense.

Nuntempe eblas difini la laboron kiel limigitan rimedon, kiel varon survoje al elĉerpiĝo aŭ, almenaŭ al nehaltigebla malabundigado. Oni laboras malpli en la tuta okcidenta mondo: kvankam la dejorhoroj plimultiĝas po ĉiu laboristo, fariĝas pli kaj pli malnombrozaj tiuj kiuj laboras. Ankaŭ pli kaj pli maloftiĝas tiuj

kiuj ankoraŭ ĝuas laboron akorde kun la tradiciaj streboj, tio estas, stabila kaj sekureca, komencintan je la fino de sinformada ciklo kaj daŭrigita iom post iom survojiĝante al progreso (aŭ *kariero*) antaŭfiksita. Sed se tiuj ĉi konitajoj estas realaj, kiu estas la reala konsisto de la procesoj kiuj antaŭvideble estos ekstartigataj en la venontaj jaroj? Kaj kiujn sociajn, antaŭ ol politikaj konsekvencojn igos tiuj procesoj, kun la ekcepto de la novaj ideoj pri la estingiĝo de la labora socio? Tiuj ĉi estas nur kelkaj el la ĝeneralaj demandoj, kies respondoj ne plu eblas prokrasti.

La limoj de la ellaboraĵo pri la laboro *kiu nepras krei*, rekonstrui kaj redistribui estas evidentaj en la sindikata praktikado mem. En la plej favoraj kazoj, sindikato sindediĉas, aŭ priokupiĝas, je la dungaj aferoj, alfrontante la problemojn unuope kaj izole, tie kie laborpostenoj estas severe minacitaj de la krizo aŭ de la procesoj de restrukturado. Jen respondoj partiaj, nepre kontraŭdiraj, aŭ preskaŭ ĉiam nesufiĉaj aŭ malvenkemaj. Ĝuste pro tia manko de ĝenerala sindikata strategio, neniam ili alfrontas la strukturajn kernojn de la okcidenta ekonomio, sed nur kelkajn esprimojn de tiuj krizo kaj dungomanko. Ili sinlimigas, do, defendi kiel eble la ekzistantajn postenojn. Ili taŭgas por savi kelke da laborpostenoj de uzino, aŭ entrepreno, ie. Sed ili neniam estas blokintaj la procesojn de dungomalmultigo jam menciitaj en ĉi eseo. Eĉ kiam tiuj ĉi provoj estas



alprenintaj pli ĝeneralan horizonton, neniam la sindikatoj estas superintaj la karakteron defendan, kio estas ja nobla kaj justa, sed nesufiĉa. Certe tia ĉi agado posedas nepridiskuteblan politikan meriton (kaj eĉ de publika bildo), ĉar la afero estas prezentita antaŭ la tiel nomita *publika opinio*, evitante siajn forgeson kaj senmemoron. Sed oni ne sukcesis preteriri. Eĉ pli, tiuj ĉi diskutadoj okaze de kolektivaj negocadoj, transformiĝis en momentoj de akordoj pri la fleksebleco kaj la postena nefirmeco, en kapableco utiligi, pli aŭ malpli amplekse, la tradiciajn sociajn dampilojn. Ŝajnas ke la laborista senesperigo, la ekstremaj manieroj alprenitaj de la luktoj dum tiuj ĉi lastaj tempoj, malkaŝas konscion pri ĉio ĉi. Kiu estas la deveno de tiom da senesperigo kiam ne temas pri plena manko de perspektivoj? Cu tio ĉi ne evidentigas la maladekvatecojn politikan kaj teoriant de la aro de la aktoroj (la partioj, la sindikatoj, la maldekstrularo) kiuj devas esti la aktivaj agentoj de la pledaro? Tamen tute ne eblas alfronti tiun ĉi problemon ne semante la konfuzon, aŭ ne sinlimigante akcepti la akordigeblecon kun la ekzistanta realo, kun la demagogio, aŭ kun la senesperigo. Ja sufiĉas okulumi la debaton (por ne paroli pri la *literaturo*) de tiuj jaroj, por malkovri ke tiu konfuzo estas enradikiĝinta en multaj. En radikala maldekstrularo, eble ne tre atenta al la *limtempoj* altruditaj de la institucia politika agendo, oni trovas la temon de la laboro apud la *konkretaj utopioj* kaj eblaj proponoj, *eblaj* eĉ en la senco de

realigeblaj, sufiĉas por tio nur momente eliri el la *Realpolitiko* kaj el la regantaj kulturaj modeloj.

La celo de tiu ĉi eseo konsistas el informado pri tio kion, ĝis nun, oni diris kaj proponis, kun siaj koncernaj ekzemploj kaj la neeviteblaj simpligoj, por daŭrigi la *kunserĉadon*.

La heredaĵo de Claudio

Napoleoni.

En sia *Prelego pri la politika ekonomio* aperinta en 1985, Napoleoni estis konkludanta tre radikale pri la atingo de la krizo, kaj ne nur de la kapitalismo, sed de la moderna mondo; la citita radikalismo aperis nete en tio, kion li difinis kiel *malsukceso de la reformismo*, kiel la fino de la kompromito kejnusana (rilata al la doktrino de la ekonomiisto Keynes). *Nek la plendungeco nek la aranĝoj de la Welfare State (tio estas: Bonstata ŝtato) estas en kondiĉoj kompensi al la subjektoj de la fakto ke ili, kiel produktistoj, estas tute identigeblaj al la produktaĵoj, tio estas, ili estas varoj mem.* En postaj verkaĵoj, Napoleoni devenigis el tio ĉi specifajn proponojn kiuj, tamen, pro siaj rompaj karakteroj rilate la klasikan reformisman skizon, ne estis alpreneblaj kiel konglomerato pragmatika ordinara: *unue*, laboron por ĉiuj, tio estas, supero de la socia divido ekzistanta inter dungitoj kaj maldungitoj pere de kompleta redistribuo de la deĵortempo samkiel de la feria tempo, kaj pere de artikigitaj kaj disvastigitaj formoj de fleksebleco, laboro

po nekompleta deĵortempo, kaj tiel plu; *due*, kreon de nova celkoncepto *produkta* ligita al la socia kaj kolektiva konsumoj, kaj ne plu fokusigita je la konsumo individua; esence li proponis ke la kernon okupu la uzaj valoroj, ne plu la kurzaj; *trie*, alprenon de la media prioritato kiel novan motoron de la tuta socioekonomia ordo, do, forlasante siajn nuancojn *korektivajn* aŭ *elektivajn*; *kvare*, replanadon de la servofako kadre de la institucioj de la socia ŝtato, pere eĉ de vera atako kontraŭ la meĥanismoj de profitado kaj amasigado. Napoleoni situigis tiujn ĉi sugestojn kadre de tre kompleksa esploro, de tuta kritiko de la industriismo kaj de la laikismo de la politiko mem, jen esploro kiu alfluis lian lastan kaj faman alvokon, *Nur dio povas savi nin*. Ja la graveco de tiuj ĉi formuloj iras multe pli malproksimen ol la formuloj mem, pro la tuteco de la rezonado kaj la radikalismo de la proponitaj solvoj, kaj pro la intelekta irlinio kiun oni povas konjekti el ili (vaste interna al la ekonomia scienco kaj al sia krizo).

Kiel malpliigi la deĵorhorojn

La eŭropa maldesktrularo povas facile atingi konkretan utopion kiu povus mobilizi milionojn da personoj: la malpliigon de la deĵorhoraro. Malpliigon de la deĵordaŭro oni konceptu ne nur




kiel teknikistan ilon por pli justa distribuo de la laboro, sed kiel vojon al malsama socio, kiu ofertu al la gento pli da libere disponebla tempo. Jen vortoj el Peter Glotz, gvidanto de SPD (Socialdemokratia Germana Partio), aŭtoro de la volumo **La sinturno de la germana socialdemokratio**, kaj konita ĉefe pro trafega difino pri la socio de la du trionoj. En tiuj jaroj kiam nenio ŝajnis serioze minaci la sekurecon kaj la dungecon, dioj garantiitaj, Glotz alprenis la lukton de la metalurgiaj laboristoj de Germanio favore al 35 deĵorhoroj po ĉiu semajno sen malpliigo de la salajroj, kiel moto por la tuta eŭropa maldesktrularo: *Necesas fari el ĝi ne privatan aferon de socian politikon* —li verkis—, *sed la bazon de pli ĝenerala iniciato kun politika kaj kultura naturoj, rilataj al la tuta socio*. En la dua duono de la okdekaj jaroj tio ĉi havis eĥojn kaj reflektajn en preskaŭ la tuta Eŭropo. Limiĝante al nia lando (Italio) ni rememoru ĉi tie la Konferencon de virlaboristoj kaj laboristinoj de PCI (Itala Komunista Partio), kiu okazis antaŭ la sinturno kaj kiu estis prezentita de Antonio Bassolino: dum ĝi eĉ oni lanĉis la moton de la 30-hora deĵorsemajno, kiel elementon kvalifan kaj karakterizan de la *nuovo corso* (nova vojo). La atingo de la propono estis klara: malpliigi la deĵordaŭron ne nur kun redistribuaj kaj justecaj celoj, sed ankaŭ kaj precipe por konstrui novan kaj malsaman socian ordon, alproprigi la teknologiajn novaĵojn kaj ilin adapti al la nunaj homaj postuloj. Ankoraŭ estas malfacile nei ke, eĉ hodiaŭ, ĝi estas la plej efika kaj simpla ilo por alfronti la iompostioma malabundiĝo de la

laborpostenoj. Sed kiumaniere ekpraktiki ĝin? Per kiuj rigidecoj kaj enartikigoj? Ĉu ĝi devas koncerni al kelkaj laboristaj kategorioj kaj, speciale, al tiuj kiuj nevolonte devas realigi malsamajn kaj trospecialigitajn laborojn, aŭ al la tuta laboristaro? Ĉu oni devas malpliigi la semajnan aŭ la tagan, la montan aŭ la jaran deĵorojn? Kaj, ĉu la salajro devas plu esti sendependa variaĵo aŭ malgrandiĝi proporcie al la horoj fakte laboritaj? Jen la komenco de alia debato.

Laboro kaj kredito.

André Glotz strebas delonge, per abunda aktivado publikiga, la ideon de malpliigo de la deĵortempo, kiun oni devus realigi grandaskale, por ĉiuj, kaj do dum longaj periodoj. La baza ideo (kolektita en *Metamorfozo de la laboro*) estas tiu de intermitaj laboradoj: la totala labortempo dumviva, por ĉiuj, malgrandiĝus ĝis 30.000 horoj, po 1000 ĉiujare (anstataŭ la nuntempaj 1600); por ĉiuj ekzistus la ebleco eniri kaj eliri la produktadon, kun plena fleksebleco, laŭ siaj propraj necesoj, postuloj kaj deziroj. La alia ideo fundamenta estas tiu de jam neevitebla disigo inter laboro kaj rento: en tiu ĉi senco, Glotz estas kontraŭa al malpliigo de la salajro proporcie al tiu





de la labortempo. Nature, ne estus la entreprenoj tiuj kiuj pagus la diferencon, sed la kolektivo socia, per la konstruo de nova socia rento.

Robota rento, laŭ la difino de Guy Aznar, tio estas, rento socia, kies kolektadon kaj distribuadon organizas la Ptato, financante ĝin per imposto je la pliigoj de produktivecoj rezultoj de la informadikumado. Aŭ ankaŭ, estus laŭ esprimo ege literaturoza, *rento minimuma garantiita*. Jen proponoj kiuj, ĉiukaze kaj nepre, enhavas substancan renversion de la lkapitalisma socia ordo. Aldoniĝas al tiu ĉi ideo de dejora malampleksigo, kunportanta plenan ŝanĝon de la regantaj laborhoraroj kaj kiun oni pro komforto povas nomi *francan modelon*, alia dejormalpliiga koncepto kiun oni povas nomi *germanan modelon*. Ĝi respektas la socian ordon kaj la regantan ritmon. Ĝi antaŭvidas la plibonigon de la semajnfinan libertempon kaj malgrandigon de la laborteman tuton ĝis 35, 30 aŭ 25 horoj po ĉiu semajno. Tiuj ĉi proponoj kunportas memdecidojn de la laboristoj kaj de siaj sindikatoj.

Ili nete kontraŭas la proponojn por horaraj fleksebligoj, kiuj, kompanse de malmultigoj de la noroj postulas deĵorojn en sabatoj, dimanĉoj, noktoj, kaj, preskaŭ ĉiam salajrajn malaltigojn, t. e., adaptiĝojn al la konvenojn de la entreprenoj. Kaj tiu de la minimuma garantiita salajro estas efikaj, sed enhavas malebligajojn kaj

kontraŭindikojn. La malpliigo *konjektas solvi la problemon pri sendungeco nur kadre de la kapitalisma produkta sistemo, kiu nur produktas varojn, sed ne socie utilajn produktaĵojn aŭ posedaĵojn*. La dua konsistas el simpla *raciigo de tio jam ekzistanta, ĉar ĝi pritraktas denove la transdonojn de la dungitoj al la nedungitoj*. La tria rimedo, laŭ Lunghini, konsistas el *pago al la nedungitoj de saslaĵro for de la marketo, ŝanĝe de laboroj ekstermarketoj, sed socie utilaj. Tiel oni reatingus, en mondo tute regata de la kurzovaloro, la kategorion de la uzovaloro*.

Verda vojo

Labori favore al la medio, krei novajn postenojn kontraŭagante la polucion, tio estas, protektante tion kion la senkontrola industriigo estas detruanta iompostioe kaj gardante tion kion povas estingiĝi definitive.

Jen ekzemploj de *verdaj laboroj*: kontraŭbrua izoligado de malnovaj apartamentoj, riparado de historiaj urbocentroj, kaj tiel plu.


Baze de la *verda laboro* estas ideo de ekonomia politiko. Grandan parton el tiuj laboroj devus esti financataj de la ŝtato, kaj konsistus el amaso de publika interveno, sed ne profite al la entreprenoj aŭ por produkti pli da cemento aŭ asfalto, sed por kontentigi la realajn sociajn necesojn.

*Tradukis kaj komentis
José Pina Tuells*

La sudo mem!

Zamenhof-Festo en Togolando

Al sendependeco



Kiam la matenon de la 15-a de decembro 1996, ruĝa flago akompanis homojn verde vestitajn al stadiono, scivoluloj demandis: *kiuj estas tiuj, kaj kial tiu procesio?* Neniel ĝenataj de tiaj demandoj, togolandaj esperantistoj atingis la ludejon, kaj poste kolektiĝis en la evangelia lernejo de la kvartalo **BE-KPOTA**, de Lomé.

La programo de la festo antaŭvidis futbalmatĉon, prelegon pri la vivo de Zamnehof kaj kunmanĝon. Tiel, jam je la sepa horo matene, la futbal-teamo de la togolanda esperantistaro ludis matĉon. Apogate de la FONDAĴO MURCIA DE TOGOLANDO, la teamo liveris belan kaj glatan matĉon. Kvankam la kunludanta teamo enpafis kvar golojn al la verda ludantaro, kiu neniom da goloj enpafis, la verduloj tamen ege ĝojis, ĉar ili povis montri al ne-esperantistoj, ke io nomata **Esperanto vivas en Togolando**. Estis ŝanco ankaŭ por ke la fondaĵo MURCIA konigos sin al junuloj kiel organizon asistantan kaj helpantan multaterene. La matĉo finiĝis je duono post la naŭa horo, post kiam devis okazi alia programero.

Je la dek-dua horo, la estraro de UTE kunvenis en la festejo por preparoli la organizadon de la Kvara Kongreso Nacia. Sekvis poste prelego pri la vivo de Zamenhof. La prezidanto, Felix K. Halaoui de J.O.T.E. (Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj), dum duona horo, prezentis la iniciatinton de Esperanto, kaj lian eltrovaĵon. Kelkaj demandoj pontis inter la prelego kaj la kunmanĝo, kiu sekvis tuj poste.

Plenplena estis la klasĉambro rezervita al la festo. La esperantistoj, venintaj el la Esperanto-Klubo NOVA SENTO, Juna

Amikaro, NOVA STELO, NOVA Amikaro, UVA kaj Junulsperto,

kunmanĝis en tre agrabla etoso. TIETO (Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando), H.P. (unu Homaro unu Planedo) kaj MURCIA (Manoj Unuiĝintaj por Radikigi kaj Cirkuligi Interhomajn Asistadojn) informis la partoprenantojn pri sia agado favore al la Homoj kaj al Esperanto. Kantoj kaj poemoj de esperantistoj, muzikoj el-kasedaj kaj skeĉoj igis la feston interesege al ĉiuj. Je la kvara horo posttagmeza finiĝis la aranĝo en la evangelia lernejo. Ĉu jam la festofino?

Vespere, io neprogramita okazis en la sidejo *Veera-ĉelo* de Tieto. Amikoj miaj, ne esperantistoj, aŭdis, ke io esperanta okazas en la urbo. Ĉar ili nomas min ESPERANTO, ili kredis, ke la festo okazos en mia domo, kie sidejas TIETO. Tial ili vizitis min por partopreni en la aranĝo. Mi estis tiam devigata improvizi ion. Jen do mi prezentis nian majstron ZAMENHOF, parolis pri la agado de TIETO, antaŭ ol eksponi la fondaĵon de MURCIA. Kuntrinko kaj frandado finigis la aranĝeton.

La 15-an de decembro 1996 estas grava tago por la Togolanda Esperantistaro. Dum ne-esperantistoj sciigis pri Esperanto kaj pri la multaj utilaĵoj kiujn ĝi ofertas, sekcioj de UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto), fondaĵoj kunlaborantaj kun la landa asocio UTE, kaj unuopaj esperantistoj uzis la feston kiel preparan aranĝon al la kvara TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso). La 137-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, celebrata en Togolando, estu neforgesinda, ĉar tiu festo estas senprecedenca en la lando.

Gleglo Koffi

HALE

Debatindaĵoj

K.F.D.

Dudek kutimaj demandoj pri Esperanto kaj ĝiaj respondoj

Kutime geesperantistoj devas senofendiĝi kiam ili aŭdas stultaĵojn pri Esperanto. Ni jam respondis la ses unuajn demandojn, kaj nun respondas al la sekvantaj kvin. Se vi havas aliajn respondojn, ni ege ŝatus ekkoni ilin, por ebla publikigo.

7. Esperanto estas kodeto senambicia, kio taŭgas kiel infana ludo, sed kiu maltaŭgas subteni literaturon aŭ kulturon vastajn, kiel tiuj de la angla aŭ hispana.

Esperanto naskiĝis por esti informilo kaj komunikilo inter diversaj komunumoj. Ĝi estas klopodo *kiu senambicia lerneja kodeto* ne povus plenumi. Se ĝi estas simpla, tio ne signifas, ke ĝi estas malefika. La interna kodo de komputiloj havas nur du erojn (nulo kaj unu) kaj oni povas fari mirindaĵojn pere de ĝi!

En vilaĝo de la Manĉo, kies nomon mi ne volas memori..." estas la komenco de la esperanta traduko de *El ingenioso hidalgo don Quijote de la Mancha*, de Cervantes, en Esperanto. Krom la verkojn de ĉi tiu geniulo, oni jam tradukis en Esperanton ĉiujn verkojn de Shakespeare kaj de la aliaj gravaj verkistoj de universala literaturo. Multaj libroj tradukitaj en Esperanton ne havas hispanajn aŭ anglajn tradukojn, kaj ankaŭ ekzistas larĝa literaturo originala en Esperanto. Tiu ĉi lingvo ja povas subteni larĝan, gravan literaturon. La diferenco estas, ke tiu literaturo estas sendependa de tiuj kapriĉoj de grandaj firmaoj eldonistaj, kiuj decidas laŭvole kian literaturon traduki kaj kia ne estas

tradukota. Verkojn kiel *Kalevala*, ekzemple, oni povas trovi nur en Esperanto kaj en siaj originalaj idiomoj. Kaj la granda diferenco estas ke la tradukinto ĉiam naskiĝis en lando kies patrolingvo estas tiu de la originala verko, malsame de la tradukistoj de la aliaj lingvoj.

Rilate al *vasta kulturo*, la kulturo de Esperanto estas la *internacia* kulturo, kiu estas la plej vasta el ili.

8. Esperanto estas lingvo kiu ne evoluas.

Se *evolui* signifas simple *ŝanĝi*, tio estas vera nur parte. Lingvaj ŝanĝoj kapriĉaj devigas siajn parolantojn studi senĉese por daŭre diri la samon... Sed Esperanto evoluas senĉese por enhavi novajn konceptojn, ideojn kaj vortojn kiuj venas en la lingvon, same kiel okazas je aliaj lingvoj. Sed en Esperanto tio okazas laŭ regularo kaj orde, evitante servutan kopion kaj mankon de logiko. Malsame de la angla kaj same de la hispana kaj la franca, Esperanto havas Akademion Lingvan kiu zorgas pri tio.

9. Se Esperanto evoluas, post kelke da tempo malsimilaj dialektoj aperos, tiel ke post malmultaj jaroj estos diversaj lingvoj kaj lingvaj baroj sinrestarigos.

Parolantoj de Esperanto ne vivas kune en sama lando, sed ili disiĝas tra la tuta

mondo. Ĉiu el ili uzas sian gepatran lingvon en sia taga vivo, kaj uzas Esperanton nur por konversacioj kun homoj de alia gepatra lingvo. Ĉu hispanoj povas dialektigi la anglan? Ĉu la angloj povas dialektigi la francan? Kaj ĉu ankaŭ la rusan?

Esperanto NENIAM volis — nek volas — uzurpi la lokon de iu ajn lingvo etna, kaj se iam oni klopodus fari tion, ni geesperantistoj el la tuta mondo forlasus ĝin. Esperanto ekzakte klopodas malebliĝi, ke iu lingvo etna altrudiĝu al aliaj lingvoj kaj kulturoj — kiel la angla faris pri la gaela kaj multaj amerikaj lingvoj — pere de sia mera ekzisto.

10. Esperanto estas idiomo sen kulturo.

La kulturo de nacia lingvo estas nacia kulturo. Tiu kulturo de internacia lingvo estas internacia kulturo. Geesperantistoj kulturatas toleremon, altruismon, internaciajn rilatojn egalnivele, literaturon kaj arton. Kun tiaj kulturoj oni generas la kulturon de l' homaro. Tial Esperanto estas idiomo kun kulturo.

11. Neniu parolas Esperanton. Ĝi estas malsukcesa afero.

Ekde 1905 oni havas Kongreson Universalan de Esperanto ĉiujare, ĉeestata de homoj el tutaj la landoj el la mondo. En 1993 ĝi estis en Valensjo (Hispanio), la sekvintan jaron ĝi estis en Seul (Koreio), poste en Tampereo (Finnio, 1995) kaj ĉiun jaron en Praga (Ĉekio). La venontan jaron oni kongresos en Sydney (Aŭstralio), . El la pluraj miljonoj da esperantistoj tra la mondo, nur kelkaj miloj povas kunveni en unu urbo — ĉiun jaron novan urbon —

pro kaŭzoj ekonomiaj, profesiaj aŭ politikaj, sed estas nombro sufiĉe granda por pruvi, ke tiu aserto estas malvera.

12. Esperanto estas utopio.

Jes kaj ne. Ofte oni konfuzas *utopion* kaj **Ĥimieron**. *Utopio* estas io dezirebla, kio indas ekzisti kaj kiun ni ĉiuj devus batali por atingi, kiel pacon mondan, bonecon, justecon, liberecon kaj longan kotopon kiu mankas al neniu kompreni. **Ĥimero** estas io kio ne ekzistas, ekzemple drakoj, sorĉistinoj, flugilaj ĉevaloj kaj kvadrataj cirkloj. Eble la utopioj kiujn mi menciis (inter kiuj estas tiu, ke gentoj komprenas unu la alian, tio estas, Esperanto) neniam oni atingos, sed ni nepre devas labori por ili egale, kaj ekzistas multaj asocioj kiuj laboras por ili, ekzemple **Unuiĝintaj Manoj**, **Green Peace**, **La Verduloj**, **Internacia Amnestio** kaj la **Universala Esperanto Asocio**, al kiuj oni devas deziri, ke ili finfine sukcesu, kvankam oni ne konsentas pri ĉiuj iliaj postuloj.

Aliflanke, *Utopio* estas la titolo de libro verkita de Sankta Tomaso Moro (angla ŝtatisto murdita de Henriko VIII) kiu temas pri ideala urbo kie ĉiu urbano vivas paco kaj harmonie. Sed **Ĥimero** estis mitologia besto kiu havis virinan kapon, korpon leonan kaj aglajn flugilojn. Konfuzi ambaŭ aferojn estas konfuzi niajn plej noblajn revojn kaj niajn malplej bonajn koŝmarojn!



Olga López

Kvazaŭ recenze:

Surbaze de *Pri Esperanta Tradukarto...* de Fernando de Diego

Ĉu esperantisto aŭ esperantano?

Lingvo estas pli perfida ol videble..., kaj multfoje oni diras tion, kion oni ne konscie vere opinias. Tiel, oni diras, ke la sufikso *-ist* volas diri *specialisto*, ekzemple, *kasisto*, *instruisto*, *gitaristo*, kaj *eĉ gramatikisto*. Sekve, mi demandas al mi, ĉu *esperantisto* estas la *specialisto* pri Esperanto?: kaj tio estas pli grava ol ĝi aspektas.

Fernando de Diego skribis en *Pri Esperanta Tradukarto*:

Esperanto suferas severajn limigojn kaj tion devus meti al si en la kapon multaj el niaj propagandistoj kaj pluraj el niaj esperantologoj kaj verkistoj. (p. 15)

Videble, sed malpli da limoj ol etnaj lingvoj. La tial nomita *riĉeco* de la angla aŭ la hispana ne estas alio ol dubesenceco, senakurateco kaj volnevoldireco, se ne tute diri la malsamon de tio, kion ni pensas. Ekzemple, kiam oni diras hispane *impertinente*, oni ne volas diri *maltaŭge*, sed *insultema*. La dubesencecon oni remetias en Esperanton pere de la vorto *impertinenta*. Kulpulo? Pensi hispane (aŭ alinacilingve), kaj ne esperante. La *natura* dubesenceco de la hispana igas nin kompreni malajn ideojn kiam ni aŭdas *falta de ignorancia* (tio estas: aŭ *manko de ignoro*, aŭ *peko pro ignoro*). Ĉu tio estas riĉo? Ne, tio estas malklereco kaj atesto, ke la etnaj lingvojn (ĉi-kaze hispana, sed abundas alilingvaj ekzemploj) faris aroj da amatorantoj, ne fakistoj veraj, kiel la

farinto de Esperanto. La aglutineco kaj sistemo de afiksoj, veraj *filozofaj ŝtonoj*, ja estas pli utilaj por kompreno ol jarcentoj da kontraŭdirantaj vortoj kaj ideoj! La aserto de de Diego (p. 10), ke nur ekzistas *monto*, *monteto* kaj *montego* por 15 hispanaj vortoj interrilataj estas maljusta kaj malvera. Maljusta, ĉar ĉiuj lingvoj havas apartajn seriojn da vortoj por la plej kutimaj ideoj en siaj kulturoj. Estas klasika la ekzemplo, ke la islanda havas nur tri vortojn signifante kolorojn, dum ni havas sep. Tamen, hodiaŭaj komputiloj komprenas kutime ĝis 16 milionojn da koloroj! La hispana uzas tri, eble kvar vortojn signifante la malantaŭon homan (*culo*, *pompi*, *trasero*), sed la araba havas **sesdek** por la malantaŭo *virina*, kaj ĝi certe havas multajn pli vortojn por kamelo ol niaj du hispanaj kaj la sola angla (*camel*). Ĉu oni devas konkludi, ke la hispana estas pli riĉa ol la angla, sed malpli riĉa ol la araba? Jen la listo: *monte-monto*, *montecillo-monteto*, *montaña-montego* aŭ *aldontero*, *loma-longomonto*, *otero-surglatmonteto*, *cerro-solmonto*, *macizo-durmonto* (kutime roka) aŭ *montaro*, *colina-surteraĵo*, *morro-rondmonteto*, *alcor*: sinonimo por *colina* el la araba, *altozano-elrigardmonteto*, *cabezo-altsolmonto* aŭ *montopinto*, *tesoglatpintmonteto*, *elevación-alto*, *altura-alteco*. La du lastaj vortoj estas metaforoj en ambaŭ lingvoj. Kiel oni vidas, Esperanto povas esprimi la 15 vortojn aluditajn de de Diego, sed la diferenco

estas, ke dum mi devis konsulti la Vortaro de la Reĝa Hispana Akademio (DRAE), oni tuj komprenas la esperantajn vortojn sen helpo de vortaro. Eble la esperantaj vortoj ne estas en la PIV, sed mi ne zorgas pri tio, ĉar vortaro, eĉ PIV, estas nur ilo, kiun oni uzas, kiam oni bezonas. Elpensi parolojn estas ne tre malfacile: temas nur pri kunigo de ideoj kaj sonoj. Sed la kreinto de Esperanto postulis, ke ĝi estu kiel eble plej universala (tio estas, ĝeneralala) . Tio ĉi estis la morto de Volapük kaj la vivo de Esperanto. Tial mi ne komprenas kiel oni *enriĉigis* Esperanton pere de *povra* (malriĉa), *skipo* (teamo), *spite* (malgraŭ), kaj tiel plu. Ĉu tiel riĉenda estas Esperanto? Ĉu ne ekzistas eblaj meĥanismoj ene de la lingvo, ke oni devas almozi vortojn el etnaj lingvoj dubesencaj? Ĉu nin hororas nia bona ilo tiom, ke ni devas malperfektigi kaj malsimpligi ĝin?

De Diego konkludas, ke ne ekzistas bonaj vortaroj dulingvaj, kaj tio kontribuas al la formiĝo de malbonaj esperantistoj (!), (p. 42). Teruraj vortoj, kiuj indikas, ke de Diego *scias* kio estas *bona* esperantisto! Mi loĝis dum pli ol dudek jaroj en Anglujo kaj pli ol 5 en Francio, kaj mi neniam trovis *bonan angliston* aŭ *bonan franciston*. Ĉio en ordo, tial. Sed mi ne komprenis skoton en internacia kunveno dum ni parolis angle; tamen, tute komprenis mi sian sesmonataĝan Esperanton! Eble tio signifas, ke Esperanto estas ilo por interkompreno..., eĉ se ĝi ne estas literatura, artaplena lingvo (?)



Kiam de Diego diras, ke la *mal-vortoj* (tio estas, vortoj kunmetitaj uzante la prefikso *mal-*) *kvazaŭ kondensigas la negativan aspekton de la sintezaj faktoroj de la lingvo*, li diras, ke li estas hispanparolanto. Amuzan aspekton havas hispanoj kiam ili diras *put a jacket on* en la angla (ĉar hispane *puta* signifas *putino*, tabua vorto), sed tio nur pruvas,

ke ili ne pensas angle, ne ke la angla verbo *to put* fikonsideras virinojn. La mala sinteno al tio konvinkas min, ke nia verkisto ankoraŭ craras dirante *se oni komparas la danan kun la itala, laŭ fonetikaj, muzikaj, harmoniaj kriterioj, tiam certe la itala superas la danan ĉirilate* (p. 47). Pura mensogo kaj stereotipo. Videble, melodio (ne harmonio, kiu postulas, ke pluraj voĉoj sonas samtempe) lingva estas **ĉiam** interna kaj alikutimigita. Tiel, ne nur la operoj de Verdi belsonas, ankaŭ tiuj de Wagner estas aŭskultindaj!


Sed plej turere ŝajnas al mi la mokema priskribo kiun S-ro Diego dediĉas en paĝo 27 al tradukanto, kiu *kun senfina pacienco klopodas traduki ĉiun nacian vorton en la originalan tekston per responda vorto esperanta, afiksumante kaj kombinante radikojn en la tre multaj ŝancoj, kiam li ne trovas puran radikon en Esperanto ekvivalentan al la tradukata esprimo*. Kaj li konkludas, ke nia tradukanto *ne scias aŭ konscias pri la delikataj problemoj, kiujn prezentas, ne la nura vortraduko, sed la tradukoj de ritmoj, psikologiaj atmosferoj, retorikaj efektoj, intenco de aludoj kaj sugestoj, interakordigo de diversaj elementoj priskribaj kaj psikologiaj, ktp*. Je la sekvinta paĝo li plendas, ke el manko de kompetento traduka rezultas *ĝenerale malalta nivelo*

artisma de la esperantaj tradukoj, pro ties lingvo kodeca, manke je esprimaj kaj estetikaj valoroj. Tradukante tiu argumento al la provinco de gastronomio,

oni devus konkludi, ke en malriĉaj landoj mankante ekvilibran, bonan dieton, oni devus malsati ĝis morto, ĉar tiuj fuŝaj manĝfarantoj damaĝas sanktan gastroharmonion... Mi ne povas kredi, ke oni taksas korektan

opinion kiu defendas kreon de *kvazaŭsekte* aŭ *ordeno* de tradukistoj, ke Esperanto estas tiel sankta, ke nur denaskaj elektitoj povas traduki en kaj el Esperanto! Ĉu nia bonega tradukisto *kihoteska* scias, ke Esperanto estas demotika (tio estas, demokratika) lingvo farita por ke ĉiuj, eĉ fuŝuloj, komprenu unu la alian? Estas vero, ke Zamenhof mem enkondukis neologismojn en la lingvo (fakte, lia tuta vortaro estas neologismoj dekomence), kaj li kreis, kiel de Diego diras, *amara, efemera, stulta, falsa...*, apud *maldolĉa, maldaŭra, malspirita* kaj *malvera*, por doni variececo al la lingvo, ne por kompliki (aŭ *malsimpligi*) ĝin. Devas esti ekvilibro inter simpleco kaj kunmeteco. Simplaj vortoj, se tro multaj, komplikigas multe la lingvon, ĝis ĝi similas etnan, kaj tial malrajtigas sian ekziston mem. La akra kritiko de Fernando de Diego atingas zeniton kiam li parolas pri Generalo Julio Manglada, pri kiu li diras, ke li estis *bonulo, kiu sen gramatika scio verkis gramatikon; sen poeziaj tekniko kaj sentimento verkis poemojn; kaj sen traduka talento faris tiajn redonojn el la hispana, ke ili estas kvintesenco de absurdo kaj ekstravaganco.* Kion la bona tradukisto ne mencias, estas ke tiu *bonulo* ankaŭ estis Prezidanto de la His-

pana Esperanto Federacio. Se prezidanto de HEF ne scias gramatikon, de Diego predikas en dezerto, kaj Esperanto estas fiasko.



Mi diras, ke opinioj kiel tiuj estas hororigaj, ĉar ili memorigas la inkvizicion, malpermeson por krei kaj verki. Lasu ostempon juĝi kaj kondamni, kaj lasu nin ĉiujn traduki kaj verki, kaj superĉie lasu Esperanton havi sian propran evoluon ekster *bela* aŭ *laŭplaĉula* vojo! Ni legu kaj kritiku, sed ĉiam mirante la laboron de tiuj, kiuj kuraĝas krei. Verketojn kiel ***Pri esperanta tradukarto***-n oni devus legi kritike (tiusence li pravas), gardante nian propran opinionon por ni, kaj ne delegante ĝin al *sciemuloj*. Esperanto estas ĉies lingvo, kaj ĉiuj faru per ĝi kaj kun ĝi ĉion, kion ili povas. El mil aŭtoroj estas unu aŭ du legindaj verkistoj, kaj por ke estus mil aŭtoroj, oni devus diri la malon de tio, kion Fernando de Diego diras. Skribi ja estas malfacile. Skribi sciante, ke oni konsideros nian infanverkon nur fuŝaĵo estas heroa, kaj neniu rajtas postuli tian heroismon al neniu. Verkisto ne apartenas al aparta raso de elektitaj vir(in)oj, eĉ se akademianoj diras tion. Skribi esperante estas ĝoja afero kaj hobbio, kaj se oni povas publikigi, la rezulton oni kunhavas. Tamen, skribi esperante estas pli facile ol skribi nacilingve, ĉar Esperanto estas pli komforta ilo en niaj manoj ol iu ajn nacia lingvo. Kuraĝu, tial, samideanoj, kunlaboru kaj kunverki por plibona, plibela, pliverkebla Esperanto!

John Hammer

Gvidrezolucio

La 69-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta de la 13-a ĝis la 20-a de Julio 1996 en Sankta Petersburgo, en kiu partoprenis 240 reprezentantoj el 21 landoj:

1 **Konstatas:**

- Elektronika poŝto kaj la TTT-paĝoj ebligas rapidan kaj efikan interkomunikadon inter SAT-sidejo, LEA-oj, fakoj kaj SAT-anaro.



- Tio kontribuas al konkreta solidareco inter la laboristoj.

- **Rekomendas:** esplori novajn eblajn servojn pere de tiuj rimedoj (al junuloj, publikigo de deklaro, ktp).

2 **Alvokas** la LEA-ojn kaj SAT-grupojn kunlabori kaj helpi la SAT-junulfakon en la varbado de junuloj por SAT.

- Rekomendas: ke SAT-kongresoj fariĝu pli allogaj por gejunuloj.

3 **Alvokas** kapablulojn proponi kaj verki artikolojn por numeroj de *Sennaciulo* dediĉitaj al sociaj problemoj kaj eventoj aŭ kongresaj temoj.

4 **Ĝojas** pro la preteco de la novfondita itala LEA agnoski la Gotenburgan konvencion,

- Instigas al kreado de novaj LEA-oj aŭ SAT-grupoj.
- Aparte kuraĝigas la svedajn SAT-anojn daŭrigi kaj plifortigi siajn laborojn.

5 **Alvokas** al revigliĝo de la SAT-frakcioj kaj ĝojas pri la super-tendenca etoso de niaj debatoj.

La statutoj de HALE

Eble ne ĉiu ano de HALE havas siajn statutojn.

Tiu ĉi estas la ŝanco, por ke ni ĉiuj havu ilin.

STATUTOJ DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

Artº 1.- Sub la nomo *Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj* (HALE) estas fondita Asocio kiu celas:

- a) Disvastigi kaj instrui la universalan lingvon Esperanton en ĉiuj laboristaj medioj, sen atenti pri siaj partipolitikaj tendencoj kaj nur konsiderante sian nepran inklinon al demokrataj kaj progresemaj ideoj.
- b) HALE ne estante partipolitika sed nur kleriga, eduka kaj kultura organizo, laŭ ĝi deklaras en la antaŭa paragrafo, celas ankaŭ, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la diversaj politikaj opinioj sur kiuj sin apogas la sindikatmovadoj, kaj instigos malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon kiun ili ricevas en siaj apartaj medioj.
- c) Kohere kun la antaŭaj paragrafoj, HALE identiĝas al la principoj kaj celoj de SAT (Tutmonda Asocio de Esperantistaj Laboristoj), Parizo.

Artº 2.- La sidejo de la Asocio estas Ca-

llosa de Segura (Alicante), strato Gral. Primo de Rivera, 6, kaj ĝi submetiĝas al la hispana aktuala Leĝo de Asocioj kaj al la spirito kaj tekstoj tiurilate de la demokrata Hispana Konstitucio. La citita sidejo povos esti ŝanĝata laŭ decido de la Ĝenerala Kunsido de la

1 a membroj.

Artº 3.- Tiu ĉi Asocio, kies agadkampo disetendiĝas al la tuta Hispanio, po-vas interrilatigi, post decido de Ĝenerala Eksterordinara Kunsido, al Internaciaj Grupoj, Asocioj kaj Federacioj kies celoj koincidas kun tiuj de tiu ĉi Statuto, por plifirmigi kaj pliefikigi nian propran agadon.

PRI ĜIAJ MEMBROJ

Artº 4.- Povas aparteni al la Asocio kiel membroj: esperantistoj, lernantoj aŭ simplaj simpatiantoj, kiuj, interesataj pri la celoj de la Asocio kaj akceptante ĉi tiun Statuton, petos sian aniĝon al ĝia Prezidanto.

Artº 5.- ĉiu membro rajtas voĉdoni en la Ĝeneralaj Kunsidoj, kaj povos esti elektata por okupi postenon en la Estraro.

Artº 6.- La membroj perdos siajn rajtojn,

kaj eĉ oni povos ilin eksigi, pro justa kaŭzo, se eblas antaŭaŭdante ilin. Povas esti kaŭzo de eksigo:

- a) Rea nepago de la asocia kotizo.
- b) Ofendo aŭ nerespektema konduto rilate la aliajn membrojn.
- c) Malobeo de tiu ĉi Statuto.

Pri tiu decido oni devas informi poste al la Ĝenerala Kunsido por ĝia eventuala



konfirmo.

PRI ĜENERALAJ KUNSIDOJ.

Art° 7.- Plej alta decida organo de la Asocio estas la Ĝenerala Kunsido, al kiu submetiĝas ĉiuj ceteraj. Ordinara Ĝenerala Kunsido devas okazi almenaŭ unufoje dum la jaro. La precizan daton fikso la Estraro, kaj en ĝi oni prezentos al la anaro la situacion de la Asocio tiel ekonomian kiel koncernan al la intereshavaj okazintaĵoj en la finita jara ciklo. La membroj ne partoprenantaj tiun Kunsidon ricevos informon pri ĝi.

Art° 8.- Tiuj ĝeneralaj Kunsidoj okazos, prefere, en la kadro de propra Kongreso, kaj se tio ne estus eble pro atentinda malhelpo, oni okazigos ilin profitante la kadron de nacia aŭ internacia kongreso.

At-o 9.- Se oni ne trovas la adekvatan lokon por okazigi tiun Ĝeneralan Kunsidon, la estraro organizos ĉiujare

Referendumon konsistantan el voĉdonilo, per kiu ĉiu membro voĉdonos por aŭ kontraŭ la listo de proponitaj estraranoj.

Art° 10.- La Ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj povas esti alvokitaj de la estraro, se ĝi taksas tion necesa; aŭ de minimumo da 15% el la membroj per prezento deskribajo kun la koncernaj subskriboj, antaŭmetante resumon de la motivoj pro kiuj oni deziras la alvokon. Ĝeneralaj Kunsidoj, ĉu ordinaraj, ĉu Eksterordinaraj, estos kunvokitaj almenaŭ dudek tagojn antaŭe, per cirkulero al ĉiuj membroj. ĉe la Ĝeneralaj Ordinaraj Kunsidoj oni decidas laŭ simpla plimulto, kaj ĉe la Ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj decidas plimuto de du trionoj de la voĉdonintoj ĉeestantaj aŭ skribe reprezentataj. Nepre la ĝeneralaj Eksterordinaraj Kunsidoj estos alvokitaj, laŭ nuna ŝtata leĝo, ĉiam kiam la traktotaj afero estu:

- 1 Promocio de estraro.
- 2 Modifo de tiu ĉi Statuto.
- 3 Akiro kaj senigo de havaĵoj.
- 4 Starigo de Federacioj aŭ enskribado en ili.
- 5 Peto pri deklaro de publika utilo.
- 6 Ratifi eksigon de membro proponita de la Estrato.
- 7 Disigo de la Asocio.

PRI LA ASOCIA ESTRARO

Art° 10.- Direktanta kaj administranta organo de tiu ĉi Asocio estas la Estraro. Tiu ĉi kunordigas kaj disvolvas la bazajn taskojn por kiuj estis kreita la Asocio. Ĝi aranĝos kaj prezentos ĉiujare la ordinarajn kaj ekesterordinarajn

buĝetojn same kiel la asocian bilancon por eventuala aprobo de la Ĝenerala Kunsido.

La Asocia Estraro konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Kasisto kaj unu Delegito por ĉiu hispana regiono reprezentante la membrojn de siaj respektivaj aŭtonomaj teritorioj.

La elektoj de la Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto fariĝos inter la membroj loĝantaj en sama urbo kie sidas la Asocio, fakte ili estos la gvida aparato kiu direktos kaj administros la societeton.

Al la dirita Estraro apartenos ankaŭ kiel konsilanto la SAT-peranto ĉe nia lando.

Koncernas la Prezidanton:

- Prezidi la estrarajn, ordinarajn kaj eksterordinarajn ĝeneralajn kunsidojn indikitaj en tiu ĉi Statuto, kaj kunvoki ilin.
- Reprezenti la Asocion en ĉiuj oficialaj, sociaj, juraj aŭ alispecaj agoj.
- Liveri la societajn pagordonojn kaj ekzameni ĉiujn ĝiajn kontojn kaj validigi ilin per la propra subskribo.
- Konfirmi la asociajn decidojn kaj ĉiujn dokumentojn kiujn iamaniere entenas rajtojn favorajn aŭ devojn kontraŭ la Asocio.
- Efektivigi la taskojn delegitajn de la Estraro aŭ Ĝeneralaj kunsidoj.

Koncernas la Sekretarion:



- Certigi ĉe la aktolibro pri la decidoj de la Estraro kaj la Ĝeneralaj

kunsidoj, subskribante ilin kune kun la Prezidanto.

- Liveri ĉiuspecajn dokumentojn kiuj, kun la subskribo de la Prezidanto, devas reprezenti, rajtigi aŭ esprimi iamaniere la kriterion de la Estraro aŭ de la Asocio mem rilate al ĝia ĝenerala malvolvo aŭ al iu specifa afero.
- Organizi kaj gardi la arkivon kaj la asocian dokumentaron.

Koncernas la Kasiston:

- Gardi la asocian monhavan, kiu devas resti en bankkonto je la nomo de la Asocio.
- Enspezi en la diritan bankon la ricevitaĵajn kotizojn de la membraro, kaj pagi la kvitancojn kaj ceterajn pagojn de la Asocio.
- Registri la enspezojn, elspezojn kaj saldojn de la Asocio. Ŝ/Li periode informos la Estraron pri la ekonomia situacio de la societo, kaj starigos bilancon je la fino de ĉiu jaro.



Koncernas la aliajn estraranojn:

- Tiuj, kiuj havas vicajn postenojn funkcios per delegoj de la koncernaj respondeculoj kaj anstataŭos ilin okaze de foresto aŭ malsano.
- Ili kunlaboros en la gvida tasko de la Asocio.

c) La cititaj taskoj por ĉiu posteno ne devas esti konsiderataj kiel unikaj, nek ili pretendas enteni ĉiujn realigotajn aktivecojn; ili estas ja nur ekzemplaj kaj bazaj indikoj.

Art° 12.- La estraraj postenoj estos asignataj dum Ĝeneralaj Kunsidoj, ili estas senpagaj kaj renovigeblaj laŭ decido en tiuj kunvenoj.

Monaj rimedoj:

Art° 13.- La fondiĝa propraĵo de la Asocio estas ne ekzistanta, kaj la ĉefa subtenrimedo por ĝi estas la kotizoj de la anaro. La kvanto de tiu kotizo estu starigita de la Estrara Kunsido kaj submetita al la koncerna aprobo de ĝenerala Ordinara Kunsido. Tiun ĉi normon oni sekvas en ĉiu nova modifo de la diritaj kotizoj laŭ ekonomiaj ĉiumomentaj bezonoj. Se iu membro deziras plialtigi la propran kvoton, tiu plialtigon oni konsideros kiel donaco. Laŭ sama koncepto *donaco* oni akceptos la oficialajn kontribuojn kaj eksterordinarajn privatajn alportojn.

Eventuale la Estrara Kunsido povos esceptigi de la kotizpago aŭ redukti ĝin al tiuj membroj kiuj, pro malfavoraj cirkonstancoj, ne facile povos ĝin pagi.

Art° 14.- Ne posedante propran havaĵaron, tiu ĉi Asocio devas alĝustigi sian buĝeton jaran al la monrimedoj de siaj enspezoj, fiksante kiel limkvanton de tiu buĝeto 90.000 pesetojn.

Pro propra revuo kaj eldona fako:

Art° 15.- Kiam la nombro da membroj kaj la ekonomiaj eblecoj de la Asocion permesos, la Asocio publikigos

bultenon kiel oficialan organon de la socio. En ĝi oni uzos la Esperantan Lingvon, kaj oni publikigos literaturajn artikolojn, aŭ presperantistan propagandon, aŭ prilaboristajn temojn.

La Asocio ankaŭ projektas starigi *Eldonan Fakon* kiu entute sekvas similan linion al tiu de sia bulteno kaj celos disvastigi tiujn principojn fundamentajn de la Asocio.

Pri ĉeso kaj likvido:

Art° 16.- Tiu ĉi asocio ne povas malestiĝi sene de antaŭa decido de Ĝenerala Eksterordinara Kunsido. Se oni decidus tiel, oni nomigu likvidan komisionon kiu, fininte sian administran laboron, se ekzistus pozitiva saldo, liveru ĝin al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj se tio ne estus ebla, al la Hispana Esperanto Federacio.

Callosa de Segura (Alicante), Aŭgusto



LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

El *Lirikaĵ perloj de Al-Andalus*,

de Antonio Marco Botella

Kiel estas rimarkebla, la miksiĝo de mistikismo en la motivoj de la poemo kreas certan duoblan sencon ne ĉiam kompreneblan de nemistikuloj. Sendube li volas meti en ĉiun poemon spiritan mesaĝon. Tiu estas, tre probable, la originaleco de la poezio de Ibn Arabi: lia insisto pri la spirita mesaĝo, eĉ kiam la temo ne facile akceptis ĝin laŭ la ĝenerala vidpunkto, kaj tio bone eksplikas, kial imamoj acide kritikis certajn poemojn de la Murcia mistikulo: ja ili tute ne kapablis penetri en la kernon spiritan de liriko kun aldonaj pli altaj valoroj ol la ordinaraj. Laŭ li, Dio estas en ĉiu kreaĵo kaj la universo estas sumo de diaj esencoj. La imamoj legis kaj komprenis nur paragrafojn nudaj de spirita signifo, kaj ilia miopio ne lasis ilin vidi alian gravan elementon, la belecon, ĉar sendube belaj estas ĉi tiuj versoj:

*Pri kolomboj mi parolas,
kuj kveras en la boskoj
per dolora ton' varia
sur la branĉoj kaj sun-oro:
ili ploras pro l' amanto
triste-larme sen konsolo.*



*Kun okuloj larmo-plenaj,
sentesprimo dela koro,
mi demandas al la vento:
ĉu vi scias pri amoro,
kiun en l' arbar' mi perdis
kaj mi amas kun fervoro?
Ĉu tagmeze ŝi ripozis
en l' arbar' sub branĉo-ombroj?*

Eblas reprodukti multajn aliajn poemojn kun similaj karakterizoj:

*Mian vivon tuj mi donus
por virinoj tiel belaj
kiel tiuj ĉarme blankaj
kiuj iam plej ludemaj,
kisis kun mi Sanktan Ŝtonon
kaj Kolonon por mi benan.
Kiam perdos vi la spurojn
de knabin' en lud' koketa,*

*la parfumo eskvizita
kaj allogo virineca
enkondukos vin al celo
sur la vojo am-sukcesa.*



*Nokt' sen lumo min
neniam
trafis per obskuro densa
sen reveki l' iluzion,
ke sub lum' de luno plena
ni kuniris en l' ignoro
de danĝeroj ĉiam eblaj:
estas ŝi dum nokt' aŭroro;
kiel lum', se tago venas.*

*Unu el knabinoj ravaj
mi preferas, la plej belan!
kiam ŝi malkovras lerte
sian lunvizaĝon helan,
lumas ŝi samkiel suno
se ĉe l' Orient' aperas.
La vizaĝo blanka ŝia
al la suno apartenas,
kaj la bukloj ŝiaj nigraj
en la nokto certe nestas,
sun' kaj nokto kunfanditaj
en mirinda uj' anĝela:
lum' dum nokt' ŝi por mi estas,
nokt' dum tag' pro haroj revaj!*

Dairiqota

Kajeroj _____
_____ **el la Sudo**



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
E30080 MURCIA,
HISPANIO

<http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.html>



Depósito legal: MU-798-1996
Presejo: Anka Ĉus'